

LA DEK-SEPA



Organe Mensuel Espérantiste.

RÉDACTION ET ADMINISTRATION : H. de COPPET
179, Boulevard Pereire, Paris.

ABONNEMENT : 1 franc par an. — Ne paraît pas en Août et Septembre.

TARIF DES ANNONCES :

Une année : 1/4 page, 40 fr. ; 1/2 page, 70 fr. ; une page, 120 fr.

Bonaŝo Jaroŝo !

Al ĉiuj batalantoj por Esperanto, francaj aŭ alilandaj, gelegantoj de la « Dek-Sepa », ni esprimas tre kore mil bondezirojn pri saneco kaj feliĉeco dum la komenciginta jaro 1913. Ni samtempe dankas ilin pro la ĝentilaj kuragigoj kaj la aprobado afabla, kiujn ili donis al ni konstante en la jaro pasinta.

Povu 1913 senĉese kaj multege kreskigi la nombron de niaj samcelanoj por la triumfo plej rapida de nia movado !

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

GRUPO FUNDAMENTISTA « LA DEK-SEPA »

Groupe Espérantiste du XVII^e Arrondissement de Paris.

Réunions amicales tous les Mercredis soirs, à 9 heures, Café de la Gare, 6, Place Pereire, Paris. Entrée particulière. Téléphone 530-46. Métro : Pereire.

Nos Diners mensuels.

Les prochains Diners mensuels du Groupe auront lieu les Mercredis 8 Janvier et 5 Février 1913, à 8 heures très précises du soir, Café de la Gare, 6, place Pereire, Paris. Prix : 3 fr. 25 (boisson et pourboire compris).

700.006 - B

Prochaines Réunions.

- 8 Janvier. — Monata vespermanĝo sekvata de esper. ludoj.
15 Janvier. — S-ro Robert Germain : Humora rakonto de Mark Twain.
22 Janvier. — S-ro Henry van Etten : Tra Paris malnova (lumbildoj).
29 Janvier. — S-ro Georges Zigler : Pri Sinjorino Récamier.
5 Février. — Monata vespermanĝo sekvata de esper. ludoj.

Le Secrétaire : ROBERT BOLLACK.

AVIS IMPORTANTS

Le Comité prie les membres du Groupe qui ne l'auraient pas fait, de bien vouloir envoyer leur cotisation pour 1913 à notre trésorier **M. G. Daniel, 2, rue Guersant, Paris 17^e, avant le 20 Janvier 1913.** Passé cette date, notre trésorier fera recevoir par la poste, ce qui entraîne des frais supplémentaires.

Comité du Groupe. — Dans sa dernière réunion, le Comité de notre Groupe a décidé que celui-ci réaffilierait directement à la S. F. P. E. et à l'U. E. A. (comme *esperantia entrepreno*).

Réunion mensuelle des Groupes Parisiens. — Le Mercredi 15 Janvier 1913, les membres des Groupes Espérantistes Parisiens « Verda Stelo », « Paris-Bastille », « Paris-Est » et de l'Association Espérantiste Commerciale et Industrielle seront cordialement reçus au siège de nos réunions, Café de la Gare, 6, place Pereire, Paris.

SE VI SUPERAS pri la STOMAKO aŭ la INTESTOJ, ne hezitu unu minuton provi la

MAYA BULGARE

Bulgara Lakta Kazeajo, kaj vi neniam plu suferos.

Informoj estas riceveblaj de la Societo

Maya Bulgare, 332, rue St-Honoré, Paris. Téléphone 214-40.

La monato Esperantista.

En Paris multe da propagandaj kunvenoj okazis de Oktobro ĝis Decembro. Ni citu hazarde : Urbdomoj de la V-a, IX-a, XIII-a kvartalaroj, Université Populaire (Faubourg Saint-Antoine), Liberiga Stelo (en la « Bellevilloise »); en la ĉirkaŭaĵo okazis ankaŭ festoj en Rosny, Joinville-le-Pont, Saint-Denis, Asnières, Saint-Leu; ĉiuloke la ĉeestantaro estis multenombra kaj la movado en nia regiono estas promesplena por la estonta jaro.

— En Limoges, okazis propaganda festo dum Novembro; same en Bordeaux, Le Mans, Amiens, Beauvais.

— Nia nacia kongreso (S. F. P. E.) okazos en Toulouse, la tagon de Pasko (23-an de Marto) 1913.

— En Charleville, katolikoj aranĝas oficejon por la propagando de Esperanto.

— En Valence, grupo estas fondita (sekretario: S-ro Mége, 20, rue Marguerite).

Eksterlande la movado esperantista ankaŭ estas grava:

— En la ĉirkaŭaĵo de München estos provata la starigo de Parkurbo Esperantista.

— Novaj kursoj okazis en Innsbruck, Pekin, Schveringe (Nederlando).

La ŝtato Sergipe (Brazillando) permesas instruadon de Esperanto en la Normala Lernejo kaj en Ateneo Sergipense.

Ni finos tiun ĉapitron, dirante, ke en London la tiea delegito de U. E. A. faris multajn paroladojn en diversaj kluboj de la granda angla ĉefurbo.

Resume : ni rigardu antaŭen energie kaj konfide !

*
* * *

Pri la gazetaro ankaŭ estas por diri.

— Unue, varman dankon ni ŝuldas al F-ino Pelletier, direktorino de la « Langue Internationale » en Louhans, kiu fondis novan gazeton : « Le Petit Espérantiste ». Varbi Esperantistojn estas bona tasko, sed al kutimigi ĝeinfanojn al Esperanto per interesa ligilo estas pli bone ! (Redakcio de « Le Petit Espérantiste », 39, Grande Rue, Louhans (Saône-et-Loire), France.

— « Lingvo Internacia » regalis sian legantaron per interesplena raporto pri la Oka Kongreso. S-ro Ned Katryn sprite kaj detale rakontas sian kongresan impreson, ĉu pri la moroj de la kongresa urbo, ĉu pri la kunsidoj, ĉu pri la festoj, ĉu pri la ekskurso al la salminejo de Wieliczka, kie

*Ĝi guto malgranda konstante frapante
Traboras ĉapelon pajlitan.*

kaj kie

*Ni ŝvitas kaj ŝvitas, neniam laciĝas,
Pri l' tempo ripoza pensante,
Cent paŝoj fariĝas, mil paŝoj fariĝas,
Ni ŝvitas kaj ŝvitas konstante,
« Ho, haltu ! » plorante virinoj admonas ;
« Ne haltu, ne haltu ! » en horo resonas,
« Obstine antaŭen »*

kaj fine

*Ni paŝo post paŝo, post longa laboro,
Atingis la celon en ŝvito.*

Kaj samtonaj estas la 90 paĝoj de la raporto. Prava vi estas, S-ro Ned Katryn, kiam vi opinias, ke internacia Kongreso estas pli festaro ol kunveno de delegitoj « rajtigita » pagantaj aŭ ne.

Tiu raporto restos unu el la plej belaj verkoj de nia literaturo. Ni rekomendas ĝian legadon.

— « Le Monde Espérantiste », sub la titolo « La nunaj devoj », skribas per la plumo de S-ro Lamant, interesan artikolon. Jen eltiraĵo :

« Pri U. E. A. la afero estas tute simila kiel pri S. F. P. E. Per tro malalta kotizaĵo ĝi ne povis vivi, sekve la ĵusa plialtigo nin ne forigu. Ni pagu gaje 1 Sm. Bedaŭrindega estus la morto de U. E. A. Ĉiutage mi ricevas kiel delegito, korespondaĵojn, kiuj pruvas al mi, ke ĝi mirinde disvastiĝas, ke ĉiam pli kaj pli gravaj firmoj ĝin uzas. »

Bone, S-ro Lamant, bone skribite : « La Dek-Sepa » ĉiam opiniis kaj ankoraŭ nun opinias, kiel vi. Vivu S. F. P. E. ! Vivu U. E. A. !

ROBERT BOLLACK.

L'Espéranto à Paris et en Banlieue.

La distribution des prix du « Groupe Espérantiste de Paris » a eu lieu le Dimanche 24 Novembre 1912, à la Sorbonne, sous la présidence de M. Charles Moureu, membre de l'Institut et de l'Académie de Médecine.



L'Association Espérantiste Commerciale et Industrielle, dans sa dernière séance du Comité, a décidé de nommer des délégués dans les villes de province et de l'étranger. Elle a avisé le Comité local d'organisation du X^e Congrès d'Espéranto (Paris, 1914) de sa ferme intention d'organiser une exposition commerciale pendant ce Congrès, et d'être représentée dans le Comité d'organisation dudit Congrès.



Un nouveau groupe fondamentaliste espérantiste s'est fondé à Paris, dans les 19^e et 20^e arrondissements, sous le nom : *Grupo Fundamentalista « Paris-Est »*. (Pour tous renseignements s'adresser à M. Fernand Blangarin, 115, rue Manin, Paris 19^e.)



La « Zamenhofa Artista Adeptaro », dans son Assemblée générale du 19 Novembre 1912, a élargi ses Statuts.

Ont été nommés : Régisseur : Mme Rémond ; Membres du Comité : Mme Grosset, Mlle C. Royer, MM. Angély, F. Blangarin, H. van Etten. Celui-ci a été désigné par le Comité comme secrétaire.

Une soirée aura lieu le Samedi 25 Janvier 1913, Café de Valois, 9, rue de Valois, Paris. (Pour tous renseignements s'adresser à M. H. van Etten, 10, rue Vivienne, Paris.)



M. Emmanuel Robert qui a introduit à Paris l'U. E. A. dès sa fondation (1908) et qui remplissait depuis les fonctions de délégué à la satisfaction générale, n'a pu les continuer en raison de ses trop nombreuses occupations. Dans le but de faire désigner son successeur, il convoqua ses auxiliaires (vice-délégué, sous-délégués et consuls). Ceux-ci décidèrent de présenter aux membres par circulaire comme délégué notre samideano M. Jacques Camescasse et comme vice-délégué notre samideano M. Robert.

Les élections ont donné les résultats suivants :

Votants 43.

Sont élus pour 3 ans :

Délégué : M. Jacques Camescasse (43 voix).

Vice-Délégué : M. Em. Robert (34 voix).

(Dans ce 2^e scrutin, M. Gillet a obtenu 7 voix et il y a eu 2 bulletins blancs.)



Une fête de propagande est annoncée au *Pré St-Gervais* (Seine). Elle aura lieu le Dimanche 19 Janvier 1913, au Théâtre Municipal, à 2 heures de l'après-midi. (Pour tous renseignements s'adresser à M. Knopf, 54, rue Compans, Paris.)



Ĉu esperantistoj estas fidelaj al esperantismo ?

Per tiu ĉi stranga demando alparolis min antaŭ nelonga tempo neesperantisto, kiun mi penadis gajni por Esperanto. Mi devas konfesi, ke tiu senpera demando min iom konfuzis, kaj mi donis iom eviteman respondon, ĉar mi ne volis — mensogi. Sed nun, alparolante vin, samideanojn, mi volas forlasi mian antaŭan kaŝemon, esperante, ke, se vi konsentos kun mia opinio, tiuj ĉi linioj ne restos senefikaj kaj, se vi ne konsentos, mi povos des pli ĝoji pro mia ne ĝusta, pesimista opinio.

Neniu logike pensanta homo faras iun gravan paŝon sen motivoj. Tial mi pensas, ke ankaŭ neniu fariĝis esperantisto sen motivoj, kaj aldonu ni tuj, sen gravaj motivoj ; ĉar bataladi por nova afero, por kiu la plej multaj homoj ne havas intereson aŭ sentas kontraŭ ĝi blindan antaŭjuĝon, bataladi por afero, por kies utileco ne nur grandamaso de popolo, sed grandparte eĉ registaroj, scienculoj kaj ĉiuspecaj eminentuloj ne havas sufiĉan komprenon, estas sendanka, senprofita, oferojn kaj idealan kuraĝon postulanta takso. Tial ni konkludas, ke la ĉefa motivo de via laboro por Esperanto kaj esperantismo estas via interna konvinko pri tio, ke vi batalas por alta, homara kaj praktika celo, ne atendente profitojn aŭ honorojn por vi mem.

Se vi tiun vidpunkton aprobas, estas ankaŭ tuj klaraj ĉiuj necesaj agadoj por apogi esperantan movadon.

Kiam vi iam malsaniĝis kaj prenis laŭ kuracista konsilo ian medikamenton, vi certe ne atendis vian tujan resaniĝon post la engluto de kelkaj piloloj. La naturo aŭ sorto provizis nin je multegaj mankoj kaj eduko, kutimo, klara antaŭjuĝo aŭ vivbatalado ankaŭ fuŝis nin iom. Ĉu Esperanto aŭ esperantismo povas esti tiom sorĉaj piloloj, kiuj nin tuj resanigos kaj liberigos de mankoj, kiujn centjaroj naskis?

Esperantistaro konsistas el homoj diferencaj je deveno, okupo, eduko, moroj, kutimoj, socia pozicio, k. t. p. Ne postulu ni unu de alia, ke iu sin aliigu laŭ nia kaprico aŭ persona opinio. Akomodu ni nin, havante ĉiam grandegan taskon antaŭ okuloj kaj tiam ni povos ĉiam kune labori sen perdo de la propra forto. Esperanto kaj esperantismo ekzistas nek por iuj klasoj, nek por riĉuloj aŭ malriĉuloj, nek por profesoroj aŭ laboristoj nek por aristokratoj aŭ socialistoj, nek por religiuloj aŭ liberpensuloj. Esperantismo devas ekzisti por ĉiu nobla, honesta homo.

La ĉiutaga vivo donas al ni pli ol sufiĉe la okazon akrebatali por niaj personaj aferoj, la ĉiutaga vivo plenigas pli ol sufiĉe niajn animojn per ĉagreno, malĝojo, kolero, malamikeco, envio kaj egoisma sento. Lasu ni al Esperanto, tiu ĉi plej juna kaj plej bela infano de nia plej nobla sento, ĝian idealan aspekton, ĝian puran veston. Oni ja diras, ke ĉiu homo devas havi iun strangajon, iun frenezeton. Estu por ni esperantistoj Esperanto kaj esperantismo nia nobla frenezeto kaj lasu ni al niaj posteuloj serĉi pli justan nomon por ĝi, pli justan prijuĝadon de nia laboro.

Sed ne sufiĉas konsideri, por kio ni laboras; ni nepre devas al ni ĉiam klarigi, per kio ni volas atingi la celon. Nia ilo estas kaj estos lingvo esperanta, sen kiu ni nek unu paŝo alproksimigos al nia celo, al realigo de esperantismo. Ĉu tiu ĉi opinio povas esti alia ĉe iu esperantisto. Certe ne. Kaj tamen estas multaj, tre multaj inter ni, kiuj lerninte iom Esperanton, eble tiom, ke ili povas kompreni pli facilan legadon aŭ skribi kelkajn poŝtkartojn (ofte erarplene), opinias, ke tia scio sufiĉas por nia grandega tasko. Tute malprave. Sukceson por nia ideo, por niaj celoj ni povas nur tiam esperi, kiam ni mem al homoj pruvos, ke nia afero estas matura, ke ni mem estas spirite maturaj por realigi niajn celojn en praktika vivo, unuvorte, kiam ni pruvos, ke nia lingvo

estas vivanta kaj ke ni flue ĝin parolas. Tion ni povas atingi nur per pli regula kaj diligenta vizitado de niaj diversaj kunvenoj, parolante en ili ĉiam esperante,

En niaj ĉiutagaj okupoj kaj niaj fakoj ni ja ne volas resti fusuloj, nu, tiam ni ankaŭ ne restu fuŝuloj rilate al afero, al kiu ni alportas la plej idealan oferon de nia koro kaj animo!

(El « German-Esper. Gazeto ».)

DRESDENANO.



EN FRENEZULEJO

En pluva aŭtuna tago mi ricevis leteron.

Al mi letero!... Tio ĉi estas ja neimagebla.

Kiu skribas al mi? mi havas nenian parencon, nenian konatulon. Tamen!

« Kara onklo!

« Mi sciigas Vin, ke mi jam de ses monatoj estas subkuracisto en la ĉi-tiea frenezulejo. Se mia memoro ne trompas min, ŝajnas al mi, ke vi iam esprimis antaŭ mi la deziron vidi frenezulejon. La okazo estas bona por tio ĉi; vizitu min baldaŭ kaj via deziro povos efektiviĝi. K. t. p. »

« Via nevo, D-ro DESIDERO WIMMER. »

Tiamaniere parolis la letero.

Ho, ĉielo! mia malnova deziro proksimiĝas al efektiviĝo.

La sekvintan tagon mi veturis al la stacio de mia kara nevo, pri kiu mi tute forgesis.

Mi rapidis tuj iri en la frenezulejon. Demandinte la pordegiston, kie estas la oficejo, li klarigis al mi, ke mi nur bezonas iri supren ĝis la unua etaĝo.

Alveninte en la vestiblon, mi renkontis sinjoron, kiu, ridetante, gentile min salutis.

— Ĉu vi estas sinjoro Viktoro Wimmer? mi rekonis vin tuj. Volu veni kun mi; mi konas la celon de via vizito.

Mi prezentis min al la afabla nekonatulo, kies eleganta eksterajo rapide altiris mian simpatian kaj grandan estimon.

— Nun via nevo — daŭrigis li — ne estas dome. Se vi volas, mi anstataŭos lin, kaj mi petas vin akcepti mian akompanion.

— Kun granda plezuro — respondis mi.

Pri lia nomo kaj ofico mi ne riskis demandi.

Li — mi pensis — devas esti eminenta homo ; sekve li supozas, ke mi lin konas.

La ĝentilulo kondukis min sur la duan etaĝon.

— Jen, — diris mia akompananto, — tie ĉi estas la malĝoja ejo de l' vivantaj mortintoj.

Kaj ni eniris unu ĉambron, kie oni vidis kvar-kvin mal-feliĉulojn.

— Tiu frenezulo — diris li mallaŭte, montrante unu malagrablan, malĝojegan figuron, — estas konvinkita, ke en sia kapo ekzistas kaleŝo da fojno.

Mi kompatis al li, tamen mi ne povis reteni mian rideton.

Mia akompananto daŭrigis :

— La alia, tiu ĉi malgrandulo, imagas, ke li estas Homero ; kaj tiu, la blondulo, la plej freneza, imagas, ke li estas Dio, malgraŭ ke **mi mem estas Dio.**

— Ĉu vi ŝercas ? — demandis mi ridetante.

— Hahaha ! ŝerci — diris li laŭte, preskaŭ tondre. — Nu, mi povas diri, ke vi strange konas la religion ! Kion vi pensas ? ĉu estas permesite fari ŝercon per la nomo de Dio... per mia plej sankta nomo ? !

Nun mi timege rimarkis, ke liaj okuloj ŝanĝiĝas en sangon. La teruran efektivon mi tuj vidis : li estas danĝere freneza.

De timo mi komencis forkuri, sed li ekkaptis mian kolumon.

— Ha ! pekulo ! mi punos vin ekzemplodone.....

Pro la timego, mi falis surgenuen.

— Pardonu al mi, ĉiopova Dio, mi ne dubas plu vian potencon. Pardonu al via kulpema servanto.

— Stariĝu. Mi ĉesigas vian punon. Sed mi vidas, per mia ĉiopovo, ke vi eĉ ankoraŭ nun dubas mian diecon. Mi ĝin pruvos al vi, mi faros tuj mirindaĵon.

— Ne, ne, ho estro ĉiela ! mi kredas sendube vian plejpotencon.

— Dio estas konstanta — daŭrigis li kun entuziasmo. — Kion mi diris, tion mi faros. Mi jetos vin el la fenestro en la korton, kaj per mia dia potenco vi venos sendifekte mal-supren.

Mi pensis kun terurego, ke ni estas sur la dua etaĝo.

La frenezulo, kiu estis pli forta kaj pli juna ol mi, komencis min ĉirkaŭpreni por efektiviĝi sian intencon.

En tiu ĉi momento venis al mi saviga penso.

— Ho granda Dio, — diris mi tremante, — kvankam mi ne dubas vian diecon, tamen mi kuraĝas diri, ke per via intencata faro vi ĝin ne pruvos, ĉar okazis jam tre ofte, ke oni falis malsupren eĉ de la tria etaĝo ne vundinte sin. Sed mi proponas al vi tion ĉi : permesu al mi iri malsupren kaj faru, ke mi povu el la korto salti supren sur tiun ĉi etaĝon, per via grandega potenco.

Li momente pensis, poste respondis :

— Vi estas prava. Iru do malsupren en la korton kaj mi atendos tie ĉi vian grandan salton supren.

Kun plezuro mi rapidis for. Sur la strato, mi sentis kvazaŭ el la fundo de l' maro mi denove venus al la aero.

Paul de Lengyel.

Nia eminenta Akademiano verkis tiun ĉi rakonteton antaŭ 14 jaroj, kaj ĝi aperis en la unua eldono de lia *Libro de l' Humorajo* (Szekszárd, Hungarujo, jaro 1899).
N. d. l. R.

OUVRAGES de M. Henri de Coppet.

En vente à la Rédaction de « La Dek-Sepa ».

L'Esperanto appris sans maître en 15 leçons	fr. 1,50
Recueil de phrases, édition Française-Esperanto, plus de 2800 phrases de la vie usuelle	fr. 1,80
L'Espero, hymne espérantiste de D-ro L. L. Zamenhof, édition pour tenor ou soprano	fr. 1,50

LA VERA TIZANO DE L' PASTRO DE DEUIL

preparita de S-ro Duvergier, en Argenteuil, mirinde efikas kontraŭ ĉiuj doloroj, reŭmatismoj, neŭralgioj, kontraŭ la aĝ-atakoj, la mallakso kaj la grasegeco.

La paketo : 1 Fr. 50 (Sm. 0,60)

==== Tuj ricevebla kontraŭ poŝtmandato. ====

Specimeno kaj broŝuro senditaj senpage tuj post demando al
S-ro DUVERGIER, 9, Rue Laffitte, Paris.

Muzikeldonejo A. BESNARD

26, rue Antoinette, 26 -:- PARIS

Esperantia Entrepreno. — Komerca Konsulo de U. E. A.
Konto ĉe Ĉekbanko Esperantista.

Specialvendejo de esperantaj gramofonaj diskoj, gramofonoj,
violonoj, mandolinoj, gitaroj, k. t. p.

Komerco kaj eksporto de klasikaj kaj modernaj muzikaĵoj
por ĉiuj muzikiloj, esperantaj kaj ĉiulingvaj kantoj.

SENSACIA NOVAJO!!! ESPERANTAJ DISKOJ!!!

- | | | | |
|----------|---|------------------------------|----------------|
| KANTOJ | } | La Espero | L. L. ZAMENHOF |
| | | Al vi | BEMBERG |
| DEKLAMOJ | } | Preĝo sub la verda standardo | L. L. ZAMENHOF |
| | | Blanka vualo | V. DEVJATNIN |

Ĉiu duobla disko : 4 fr. (1,600 Sm.)

Katalogoj estas sendataj senpage al ĉiuj dezirantoj.

La Ondo de Esperanto Monata ilustrata revuo

(fondita en la jaro 1909)

La abonantoj de la j. 1912 jam ricevis SENPAGE romanon de A. Tolstoj :
« Princo Serebrjanij », kies prezo por ne-abonantoj estas 4 Sm. 600 afr. Nun ĉi
abonanto de la j. 1913, — krom 12 numeroj de la gazeto, senpage ricevos
denace belan Esper. libron :

« ORIENTA ALMANAKO »

el la lingvoj japana, ĥina, araba, hinda, sanskrita, persa, armena, kartvela ktp.

La « Ondo » aperas akurate la 1-an daton, novstile. Ĉiu n-ro havas 16—24
paĝojn. Formato 17 × 26. Bela kovrilo.

Literaturaj konkursoj kun premioj. Portretoj de konataj Esperantistoj. Di-
versaj ilustraĵoj. Beletristiko originala kaj tradukita. Plena kroniko. Bibliografio.
Amuza fako (kun premioj). Anekdotoj. Korespondo tutmonda (poŝtk. ilustr.).

Anonco en « Koresp. Fako » — 3 respondkuponoj.

La abonpagon (2 rubl. = 2 Sm. 420) oni sendu al « Librejo Esperanto »,
26, Tverskaja, Moskva, aŭ al « Presa Esperantista Societo », 33, rue Lacépède,
Paris (kiu vendas ankaŭ po numero, 15 Sd., aŭfrankite 20 Sd.) poŝtmandate, res-
pondkupone, papermone, per bankĉekoj aŭ per transpagilo de Esper. ĉekbanko.

KONTRAŬ
MAR-
MAL-
SANO

DELPHININE

De l' DOKTORO FLASSCHEN.

KONTRAŬ
FERVOJ-
MAL-
SANETO

Tiu ĉi farmaciaĵo, absolute sendanĝera, ricevis la **Grandan
Premion** ĉe la Internacia Ekspozicio de Higieno, okazinta en
Parizo en 1908.

Prezo de la boteleto : 10 fr. (4 Sd.)

Aĉetebla ĉe S-ro WEITZ, 8, Rue de Duras, Paris
kaj ĉe ĉiuj farmaciejoj.



Vera
Ferhava Salo
alsimiligobla

ELTROVITA DE
M. Maurice ROBE
en 1881.

LA

Fer Robin

mirinde efikas

KONTRAŬ

SENSANGECO,
PALKOLORECO,
SANGELFLUOJ
ĈIUSPECAJ

Akcelas la nutradon kaj
neniam mallaksigas.

Tiun ĉi kuracilon, absolute sengusta, oni uzas laŭ la dozo de 10 ĝis 30 gutoj ĉe ĉiu manĝo, ĉu en loma akvo aŭ vino. La enhavo de la boteleto reprezentas la daŭron de tri semajnoj ĝis unu monato da kuracado.

Por eviti la falsajojn

POSTULU la ROBIN

VENDEJO POGRANDE:

13, Rue de Poissy, PARIS